

KONVERSACIA

LITERATURO

5

LA LITERATURON SKRIBIS
LA PERSONOJ EN LA KONVERSACIO.

Espar. 485 I

Ĉiu rajto rezervita.
Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Hago

Bonan matenon!

Gesinjoroj, rigardu min!

Mi estas la **poŝtisto**, la plej grava persono en la urbo.

Mi portas al vi la leterojn kun la sekretoj kaj kun la mono.

Mi estas diskreta homo: mi ne legas la leterojn. Sed mi vidas en viaj okuloj, ke vi estas feliĉaj kaj ke vi ŝatas min.

Gesinjoroj, mi petas vin:

1) Skribu la adreson per belaj literoj, ĉar miaj okuloj ne estas tre fortaj.

2) Metu la poŝtmarkon sur la bonan lokon sur la dekstra parto de la koverto.

3) Ne sendu monon en simpla letero kaj ne diru, ke mi prenis la monon el la koverto.

4) Leteron kun sekreto metu en dikan koverton inter kolorajn paperojn, ĉar mi tenas la leteron al la lumo kaj mi legas la tutan.

Gesinjoroj, vi vidas, ke mi estas bona homo.

Ĝis la revido!

La fruktoj

estas la plej bona manĝaĵo. Tiuj personoj, kiuj manĝas multajn fruktojn, restas dum la tuta vivo sanaj, junaj, fortaj kaj belaj.

Tiu, kiu ne kredas, faru kontrolon!

La bestoj.

En la mondo vivas multaj, tre multaj bestoj. Ili ne estas egalaj, sed ili estas diversaj, tre diversaj. La plej gravaj bestoj havas kvar piedojn. Ili havas infanojn kaj ili donas lakton al siaj infanoj.

Al la koro de la homo plej proksimaj bestoj estas la **hundo** kaj la **kato.** Ili estas bonaj, belaj, inteligentaj bestoj. Ili estas kvarpiedaj amikoj de la homo. La hundo havas unu inteligentan kapon, kvar maldikajn piedojn kaj unu tre gravan parton, ĝi estas la **vosto** (= „malkapo"). Per la vosto la hundo montras, ke ĝi estas feliĉa. — La hundo kaj la kato ne estas amikoj, sed ili estas malamikoj, grandaj malamikoj. La hundo diras al la kato: *„Vaŭ, vaŭ!"* La kato estas malfeliĉa kaj ĝiaj haroj staras.

La plej eleganta besto estas la **ĉevalo.** Ĝi estas granda, bela, forta kaj tre inteligenta doma besto. Ĝi estas *utila* besto, ĉar ĝi laboras kun la homo kaj la homo sidas sur ĝi. Ankaŭ la ĉevalo havas voston kun tre longaj haroj.

La plej inteligenta besto estas la **vulpo.** Ĝi estas tre inteligenta, tre *ruza*. Ĝi havas ruĝajn harojn, longan nazon kaj grandan voston kun multaj haroj. La vulpo estas tre malutila besto, ĉar ĝi manĝas multajn birdojn.

La plej malpura besto estas la **rato.** Ĝi estas granda muso. Ĝi vivas sub la tero en la malpuraĵoj. Ĝi estas utila besto, ĉar ĝi manĝas la malpuraĵojn. La rato vivas nur en urboj, ĉe domoj, ĉar malpuraĵoj estas nur tie, kie homoj vivas.

La plej grava kaj plej perfekta besto estas la **simio.** Inter la simio kaj la homo ne estas granda diferenco. La profesoroj diras, ke la simio estas la patro de la homo. Ĉu vi kredas tion? — La simio havas grandan talenton. Ĝi rigardas la homon kaj faras tion, kion la homo faras. La simio estas pli perfekta, ol la homo. La homo havas nur du manojn, sed la simio havas kvin manojn. Multaj homoj estas simioj, sed ne perfektaj simioj.

La plej bela kaj ĉarma kvarpieda besto estas la **sciuro.** Ĝi havas grandan voston kaj belajn malgrandajn manojn. Ĝi vivas sur la arboj en la parkoj kaj manĝas malgrandajn fruktojn. La sciuro estas granda akrobato sur la arboj. La infanoj rigardas ĝin, estas feliĉaj kaj donas al ĝi manĝaĵon.

Ĉi tiu besto ne estas birdo, sed muso kun flugiloj. Ĝia nomo estas **vesperto.** Dum la nokto ĝi flugas kaj manĝas la malgrandajn noktajn bestojn. Ĝi estas tre-tre utila besto.

La diferenco.

(En la Esperanta konversacio)

Instruisto: Gesinjoroj, ĉu vi komprenas la vortojn **„edzo"** kaj **„fianĉo"?**

Gesinjoroj: Jes, ni komprenas!

Instruisto: Kio estas la diferenco? Kion signifas „fianĉo"?

Gesinjoroj: „Fianĉo" signifas: feliĉa sinjoro kun ringo!

Instruisto: Kaj kion signifas „edzo"?

Gesinjoroj: Malfeliĉa sinjoro kun ringo!

Letero.

Kara fraŭlino,

mi petas vin, prenu ĉi tiujn florojn. Ĉu vi komprenas la lingvon de la floroj?

Mi petas vin, demandu kaj atentu, ĉar la floroj respondas.

La bluaj floroj diras: „Ni estas tre bluaj, sed la okuloj de la fraŭlino estas pli bluaj, ol ni."

La flavaj floroj diras: „Ni estas flavaj, sed la haroj de la fraŭlino estas pli belaj, pli blondaj, ol ni."

La ruĝaj floroj diras: „Ni estas ruĝaj, sed la buŝo de la fraŭlino estas pli ruĝa, ol ni."

La blankaj floroj diras: „Ni estas blankaj kaj puraj, sed la fraŭlino estas pli pura, pli blanka, ol ni."

La floroj parolas kaj diras: „Ni estas floroj, sed ankaŭ la fraŭlino estas floro. Kaj ŝi estas la plej bela floro!"

Silentu, silentu! Atentu la malfortan, sekretan parolon de la floroj! Ili diras: „Ni amas vin, ni amas vin!"

Fraŭlino, ankaŭ mia koro estas inter la floroj...

Via Romeo.

Gesinjoroj, rigardu!

Ĉu vi vidas?

Kion faras la sinjoro direktoro?

Li kalkulas sian monon, li faras praktikon en la Esperanta lingvo.

Li estas tre riĉa, ĉar li havas du manojn.

Gesinjoroj, faru ankaŭ vi la praktikon! Kalkulu vian monon dum la tuta nokto! Estu riĉaj kaj feliĉaj!

Gesinjoroj, rigardu min!

Ĉu vi scias, kiu estas mi?

Jes, mi estas la plej bona gasto en la tuta mondo, ĉar mi havas la plej grandan apetiton.

Gesinjoroj, ĉu vi ŝatas la bonajn manĝaĵojn kaj la fortajn trinkaĵojn?

Gesinjoroj, rigardu!

Ĉi tiu sinjoro estas la plej bona lernanto de la mondlingvo Esperanto, ĉar li iras dum la tuta tago kaj kalkulas siajn paŝojn.

Gesinjoroj, faru same!

NIK NEK KAJ KAT JEN

(Malgranda romano)

V.

La sonĝo estas pli bela, ol la vivo. Tion pensas Kat Jen kaj ŝi memoras pri la hieraŭa tago. Tiu tago estis grava en ŝia vivo. Ŝi ricevis leteron de sia direktoro Monenpoŝ. Tiu letero estis malbela, malbona! Li skribis al ŝi: „... la ciferoj parolas, ni vivas en malfacilaj tempoj kaj de nun ni donas al vi pli malmultan monon..." Jes, la sinjoroj direktoroj malgrandigas la sumon, sed ili ne malgrandigas la laboron. Kion ŝi faru? Ĉu ŝi restu aŭ iru al alia kontoro? Ŝi estas malriĉa, ŝi vivas nur per sia laboro. Ŝi montris la leteron al Nik Nek. Li diris: „Restu, Kat! La vivo estas malfacila kun laboro, sed sen laboro ĝi estas malbela."



Kat trinkis unu glason da malvarma akvo, iris al la direktoro kaj diris: „Sinjoro direktoro, mi restas en la kontoro, ĉar..." kaj sinjoro Monenpoŝ montris per la kapo: „Jes".

Nun Kat sidas ĉe la skribmaŝino kaj laboras. Ŝiaj pensoj ne estas ĉe la laboro. Ŝi memoras pri siaj gepatroj. En ilia tempo la vivo estis pli bela kaj pli facila, ol nun. La patro laboris en la urba oficejo kaj la patrino laboris en la hejmo. Ili havis harmonian vivon. La hejmo estis pura, varma. Sed nun, en la moderna tempo, la junaj geedzoj laboras en kontoroj. Ilia hejmo ne estas vera hejmo. Ĝi estas nur malvarma loko, kie lacaj homoj faras hejman skandalon. Kat

Jen scias tion, ĉar ŝi konas multajn tiajn familiojn... Kio donas la veran feliĉon al la koroj? Ĉu la amo, aŭ la mono? Ŝi pensas, pensas pri tio kaj forgesas, ke la tempo iras. Ŝi faris nur la duonon de sia laboro. Ŝiaj manoj kuŝas sur la skribmaŝino kaj en la granda silento sinjoro Mate Matik rigardas al ŝi.

— Kat, laboru! Mi scias, ke la letero de la direktoro ne plaĉas al vi, sed laboru kaj pensu pri tio, ke multaj homoj ne havas laboron kaj sen pano promenas sur la stratoj. Vi havas panon. Ankaŭ mi ricevis tian leteron, kian vi kaj vidu, mi faras mian kalkulon. La kontorlibroj montras, ke sinjoro Monenpoŝ ne havas monon en la poŝo. Multaj leteroj, kiujn vi skribas, petas monon kaj monon. Tio estas la pura vero. De longa tempo la kontoro ne ricevas monon.

— Mi scias... Mi scias, sed...

— Nun ne estas **sed,** kara Kat. Nun en la mondo estas la **„mi ne havas"** kaj la **„mi havas nur...**" Kredu, malgranda Kat, ni estas feliĉaj, ĉar ni diras: mi havas **nur**...

— Ho, sinjoro Matik, vi ne komprenas mian deziron... Mi memoris pri miaj gepatroj kaj pri ilia harmonia vivo. Ĉu nun vi vidas tian vivon inter geedzoj?

— Jes, mi vidas... Nur nun mi vidas la veran amon. Nur nun montras sin la forto de la amo. Mi konas junajn geedzojn. Ili loĝas en la sama domo, kie mi.

Mi vidas ilian vivon. Ili ne havas egoistajn dezirojn kaj tial ili havas harmonian vivon. Ili amas unu la alian kaj tiu amo donas al ili optimismon. La optimismo estas la plej kara pano de la vivo.

— Ho, kara, kara Matik, mia bona amiko, viaj vortoj donas feliĉan senton al mia koro. Ĉu vi scias, mi pensas pri pli bela vivo ol mia nuna vivo kaj...

— Mi scias, Kat. Mi konas tiun varman senton... Kredu miajn vortojn! La hejmaj skandaloj estas nur en tiu domo, kie la personoj havas egoistajn interesojn. La amon ili havas ne en la koro, sed en la poŝo. Nun, Kat, nun en la malfacila tempo montras sin la vera amo. Kredo kaj laboro purigas la sentojn, faciligas la vivon kaj donas dolĉan harmonion al la koroj... Ni laboru!

La malgrandaj manoj de Kat Jen laboras sur la skribmaŝino. Sinjoro Mate Matik skribas per la plumo ciferojn sub ciferojn.

... ...

En la malgranda ĉambro sinjoro Monenpoŝ rigardas al la murhorloĝo. Ĝi montras la tempon de la „Ĝis la revido". En la alia ĉambro la geoficistoj jam faris la tagan laboron. Li rememoras pri grava laboro, kiun li forgesis dum la tago. Li metas la plumon sur la tablon kaj iras en la alian ĉambron.



Mate Matik jam fermis la grandan kontorlibron kaj prenis sian ĉapelon. Fraŭlino Kat Jen purigas la skribmaŝinon.

— Fraŭlino Kat, mi petas vin, restu! Mi havas malmultan laboron kaj mi deziras vian helpon.

— Jes, sinjoro direktoro — ŝi respondas, sed ŝi pensas pri Nik Nek, kiu staras antaŭ la pordo de la domo. — Sed... sed...

— Ĉu vi ne havas tempon?

— Jes, mi havas, sed mi petas vin, donu al mi kelkajn momentojn... Mia... mia...

La direktoro ridas. Li komprenas la ne tutan frazon.

— Vi petas nur kelkajn momentojn... Mi komprenas. Li staras proksime al la kontoro... Nu, iru kaj revenu! Ni havas nur mallongan laboron.

Kat Jen iras al la pordo. Ŝi estas ruĝa. Mate Matik kaj la direktoro kun diskreta rido rigardas ŝin. Ŝi malfermas la pordon kaj tie, antaŭ la pordo, staras servisto de banko. Li tenas leteron en la mano.

— Bonan vesperon! Ĉu sinjoro Monenpoŝ estas en la kontoro?

— Mi estas — diras Monenpoŝ. — Kion vi deziras?

— Mi portis leteron al vi de la banko „PROCENTO".

— Donu ĝin!

— Mi petas vian subskribon — diras la servisto kaj li metas libron antaŭ la direktoron.

Sinjoro Monenpoŝ skribas sian nomon, prenas la leteron. La servisto salutas kaj kun fraŭlino Kat Jen eliras el la ĉambro.

... ...

Nik Nek kaj Kat Jen staras antaŭ la pordo de la domo kaj ili parolas. Li tenas ŝian manon inter siaj manoj. En ŝiaj okuloj ridas la feliĉo. Mate Matik venas el la domo kaj rigardas ilin. Belaj homoj, li pensas. Li aŭdas kelkajn frazojn el ilia parolo, sed ne komprenas la mondlingvon.

— Mi havas nur mallongan laboron, Nik.

Nik Nek faras per la kapo „jes".

— Rigardu, Nik! Tiu maljuna viro estas mia bona amiko. Lia nomo estas Mate Matik... — kaj ŝi salutas la maljunan librotenisto — Bonan nokton, ĝis la revido, sinjoro Matik!

Nik Nek levas la ĉapelon kaj sen vortoj salutas lin. Mate Matik resalutas ilin.

— Bonan nokton!... Kat, la direktoro havas bonan humoron. Li diris: „Hodiaŭ mi ne laboras pli. Fraŭlino Kat Jen iru hejmen!"

— Ĉu li ricevis monon?

— Ho jes! Li ricevis multan monon... Ĝis revido!

— Ĝis revido!

Mate Matik iras al sia hejmo.

— Nu, Nik, mi ne reiras. Mi restas kun vi... sed ne... Vidu, mi forgesis, ke mia manpoŝo kuŝas sur la tablo de la skribmaŝino...

Kat Jen reiras en la domon kaj Nik Nek promenas antaŭ la pordo.

... ...

Sinjoro Monenpoŝ sidas ĉe la tablo de la malgranda ĉambro kaj kalkulas la monon. Belaj novaj bankbiletoj. Li aŭdas la paŝojn de Kat Jen en la alia ĉambro.

— Ĉu vi estas, fraŭlino Kat Jen?

— Jes, sinjoro direktoro. Mi revenis, sed sinjoro Matik diris, ke vi ne deziras hodiaŭ mian laboron. Ĉu?

— Ne! Ankaŭ mi estas laca... Ĝis revido, fraŭlino!

— Ĝis revido, sinjoro direktoro — diras Kat kaj ŝi iras en la antaŭĉambron, kie Bub Destrat dormas sur la seĝo. — Nu, knabo, ĉu vi restas?

Bub Destrat malfermas la okulojn.

— Jes. La sinjoro direktoro diris, ke mi restu! Li skribas gravan leteron, kaj li deziras, ke mi portu ĝin al la adreso. Mi ne ŝatas la laboron post la ofica tempo.

— Ne estu malbona knabo! Ŝatu la laboron!

El la alia ĉambro sinjoro Monenpoŝ venas kaj tenas leteron en la mano.

— Bub, portu ĉi tiun leteron al sinjoro Kapsenmon! ... Nu, fraŭlino Jen, mi memoras pri tio, ke hieraŭ mi skribis leteron al vi. La letero faris al vi malbonan nokton. Forgesu la leteron!

— Ĉu tio signifas, ke mi ricevas...

— Jes, vi ricevas vian tutan monon.

... ...

La vespero estas varma. La aero freŝa, pura. Inter la arboj flugas malgrandaj birdoj kaj ili rigardas sinjoron Nik Nek kaj fraŭlinon Kat Jen, kiuj sidas sur benko kaj silentas. La birdoj pensas: inter la homoj

kaj la birdoj estas interesa diferenco. La birdoj amas kaj kantas; la homoj amas kaj silentas. La birdoj ne estas bonaj filozofoj. Ne, ĉar la koroj de la junaj gesinjoroj kantas. Nur ili ne aŭdas.

— Jes, Kat, mi estas malkuraĝa. Hodiaŭ en la mateno mi faris frazojn, sed mi forgesis ilin. Ili estis belaj. En ili estis la pura vero. Ĉu mi diru ilin al vi?



— Sed vi forgesis ilin... Ĉu?

— La frazojn — jes, sed la sento vivas en mi... Mi estas malriĉa kaj...

— Ankaŭ mi estas malriĉa... Ni estas malriĉaj gefratoj...

— Ĉu gefratoj?

— Vi diris tion antaŭ kelkaj tagoj sur ĉi tiu benko... Ĉu vi forgesis?

— Ne, mi ne forgesis miajn vortojn, sed mi eraris. .... Ni ne estas gefratoj. Ni estas pli ol gefratoj. Mi sentas kaj hodiaŭ en la mateno mi faris belajn frazojn pri tio. Ĉu mi diru ilin al vi?

— Sed, Nik, vi forgesis ilin! Hahaha!

— Vi ridas pri mi. Mi sentas min malfeliĉa.

— Nik, mi ne ridas pri vi. Mi scias tiujn frazojn, ĉar ankaŭ mi pensis, ke ni ne estas gefratoj kaj mi vidis, ke la gesinjoroj en la konversacia vespero rigardas nin kaj ili parolas inter si pri ni.

— Kion ili diras?

— Ne demandu min pri tio! Vi scias, kion ili diras. Ili parolas pri dolĉa sekreto.

— Kaj... kaj tio ne plaĉas al vi. Ĉu?... Mi komprenas. Ankaŭ al mi ne plaĉas tio kaj mi pensis, ke... ke... Kat, mia bona kara fratino Kat...

— Ĉu mi estas fratino?... Nik, vi ne scias, kion vi diras... Hahaha!

— Ĉar vi ne helpas al mi... Vi nur ridas. Jes, vi nur ridas kaj tio montras, ke vi ne amas min!

Longa silento. Kat rigardas la foliojn de la arbo. Nik prenas cigaredon kaj fumas.

— Vi ne demandis min pri tio, Nik... Kaj vi ne parolis pri via sento **ama,** vi parolis nur pri sento **frata** kaj...

— Nu, mi parolas, mi parolas... Mi amas vin, Kat. Mi sentas, ke vi amas min kaj en mia poŝo..., kaj en mia poŝo...

— Hahahaha! Bela amo: Vi parolas pri la poŝo kaj ne pri la koro. Ĉu via koro estas en la poŝo? Nik, vi estas ĉarma knabo! Hahaha! Via poŝo ne interesas min. Mi scias, ke vi ne estas riĉa.

— Ridu nur! Nur ridu pri mi! Kaj ridu pri tio, ke mia koro estas en la poŝo. Ĉar sciu, ke mia koro estas en la poŝo. Absolute! Rigardu kaj ridu!

Nik Nek levis sin de sur la benko kaj li prenis malgrandan skatolon el sia poŝo.

— Prenu ĝin kaj ridu kaj rompu mian koron!

Fraŭlino Kat Jen sentis ploron en sia koro. Ŝi rigardis al la okuloj de Nik Nek

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA
KUL
Esperanto
485 1
Ł-11220

kaj vidis en ili varma
kio estas en la mal
flavaj ringoj. Nik di
en la poŝo.

— Nik, ne forgesu
granda oficistino... l
monon...

— Kat, mi ne parolas pri mono kaj domo... Mi demandas, ĉu vi amas min? Mi demandas, ĉu vi havas kuraĝon en via amo kaj kredon pri la vivo? Mi demandas nur, ĉu vi deziras harmonian vivon kun frata koro en la laboro?

— Jes... jes, Nik, mia kara bona frato...

— Ĉu nur frato?

— Ne nur frato, sed mia sola, mia plej kara Nik!

Nik Nek prenas la maldekstran manon de Kat kaj li metas la ringon sur la fingron, kisas la manon kaj li diras nur mallongan frazon, sed en la vortoj estas lia tuta feliĉo kaj kora varmo:

— Kat, mia kara fianĉino, mia sola feliĉo.

Longa, longa silento... La birdoj sidas sur la arboj kaj rigardas ilin. La vortoj de Kat rompas la silenton. Simplaj, sed tutkoraj vortoj al la Sinjoro de la mondo. En ili estas vera danko kaj tutkora peto:

— Dio, ne forgesu pri ni, pri viaj infanoj!

Kun kuraĝiga optimismo diras Nik Nek:

— Lia amo portis min ĉi tien kaj mi sentas, ke Lia patra mano metis vian manon en la mian.

La birdoj sur la arbo atentas. La koroj kantas.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL